

David van Reybrouck ZINKO

Mi volas ion rakonti el la libreto ZINK de la belga aŭtoro David van Reybrouck. Tiu libro estas novelo pri la fama landeto Moresnet, kiu ekzistis inter 1816 kaj 1916.

La historio komenciĝas kiam obeza kuracisto kaj alĥemisto el Svislando, la kaprica pedantulo kiu ŝanĝis sian nomon en Paracelsus, en 1526 atente rigardas al la arĝentblanka sedimento sur la interna flanko de sia fandofornego. Jam almenaŭ dek kvin jarcentoj ĉiu pensas ke nur ekzistas sep metaloj - oro, arĝento, kupro, stano, plumbo kaj hidrargo - sed eble ekzistas pli. Eble la klasikuloj eraris. Eble ĉi tiu malkruda pulvor-tavoletostas pli ol la kolorigaĵo kiun oni jam dum jarcentoj miksas kun kuprerco por akiri 'flavan kupron', latunon, por la produktado de kandelingoj, incensuoj kaj moneroj. Eble ĝi mem estas metalo. Paracelsus fikse rigardas al la sedimento en la fandofornego. Li vidas kiel pintaj la kristaloj estas kaj pensas pri germanaj vortoj, vortoj kiel *Zahn, Zacke, Zind, Zinne, Zinken*, se ĝi nur referencu tiun pintan. *Zink*, li decidas, tiel ĝi nomiĝos. La vorto estos akceptita de ĉiuj lingvoj en la mondo.

Cadmia. alamine. Kalamijn. Galmei. La greka vorto por zinkerco enpenetris la modernajn eŭropajn lingvojn. La plej grava minfosejo en Eŭropo situis ĉe vilaĝeto kiu ne hazarde nomiĝis Kelmis, La Calamine en la franca lingvo. Ĝi situis en la historia duklando Limburgo, tridek kilometrojn de Maastricht, kaj jam de longe oni tie elfosis zinkspaton, oni ankaŭ nomis ĝin Altenberg.

Mallonge post kiam Napoleono naciigis la minon, la lieĝa ĥemiisto Jean-Jacques Dony kiel plej unua en Eŭropo malkovris kiel oni povas akiri **puran** zinkon. Lia metodo ĉie estos kopiata, sed Dony nur malmulte rimarkis pri sia sukceso. Li tiom investis en sian eltrovon ke li bankrotis. Al Napoleono li iam senpage sendis malpezan, zinkan vojaĝbankuvon - faciluza dum kampanjoj - sed mendoj ne okazis. Li tute senhave mortis.

Intertempe ankaŭ la mondo ŝanĝiĝis. Post la Batalego ĉe Waterloo en 1815 la mapo de Eŭropo radikale devis esti redeseignata. Unu el la limoj kiujn oni devis fiksi dum la Kongreso de Vieno estis tiu inter Prusujo kaj la ĵus fondita Unuiĝinta Reĝlando de la Nederlandoj. Tio glate okazis por la pli ol kvincent kilometroj - sed pri strieto de tri kilometroj oni ne povis iĝi unuanima: la strieto kie situis la zinkmino de Kelmis. La finakto de la Kongreso de Vieno ne donis decidan respondon: laŭ paragrafo 25 la Nederlandoj havis la rajton, laŭ paragrafo 66 ŝajnis ke ĝi ĝuste apartenis al Prusujo. Diplomataj paktoj tiam estis pure tekstecaj, neniu mapo aldoniĝis.

Post unu jaro kaj post eĉ kvindek kunvenoj tiam tamen ekestis kompromiso Ĝi fariĝis neŭtrala regiono. La 'provizoraj limoj', kiel deklaris la Traktato de Akeno, rekte tranĉis tra la teritorio de la malnova komunumo Moresnet. Tortopinto de 3,44 kvadratkilometroj. Kompare kun aliaj statetoj kiel San Marino (61 kvadratkilometroj), Liĥtenŝtejno (160 kvadratkilometroj) kaj Andoro (468 kvadratkilometroj) ĉi-okaze tio vere koncernis paneron.

La trilanda punkto ĉe Vaals fariĝis kvarlanda, la ununura de Eŭropo: oni de ĝi povis aĉeti bildkartojn.

Krome fondiĝis en 1837 la *Société Anonyme des Mines et Fonderies de Zinc de la Vieille Montagne*, mallonge Vieille Montagne, franca por Altenberg, la malnova nomo por la zinkfosaĵo. La bankrota zinkfandejo de Dony faris spektaklan restarton kiam Dominique Mosselman, pariza bankisto kun bruselaj radikoj, komencis enmiksiĝi en ĝi. Vieille Montagne en la sekvantaj jardekoj elkreskos al la pli granda zinkproduktanto en la mondo, pro kio la graveco de la limregiono

reakcentiĝis kaj internacia akordo ŝajnis esti pli for ol iam. La lignajn limfostojn, kiujn oni martelis en la teron en 1816, oni anstataŭigis per sesdek ŝtonaj ekzempleroj. La plej multaj hodiaŭ ankoraŭ staras tie, mi konstatas kiam mi dum bela aŭtuna tago komencas serĉi en la arbaro.

La regado inter tiuj limfostoj tre rimarkinde okazis: Leĝdonado originis de leĝoj el la franca tempo: tiel longe kiel Prusujo kaj Nederlando ne povis interkonsentiĝi pri definitiva regulado, la napoleonaj leĝoj daŭre validis. Absurdismo atuto: Francion venki kaj poste firmteni la arĥaikajn francajn leĝojn.

Elektroj? Neniam okazis. Impostoj? Tre malaltaj kaj nekomprenblaj, kalkulitaj sur bazo de tero, pordoj, fenestroj, mebloj kaj domservistoj, kiujn oni posedis. Moneroj? Neniu. Oficiale nur la franca franko estis valida, sed ankaŭ la *Johannisthaler*, la *Reichsmark*, la *Silbergroschen* kaj la belga franko estis bonvenaj. Lingvo? Neniu. intermiksita la germanan, la francan kaj la *Kelmeser Platt*, io inter *Plattdütsch* kaj limburga. Dogano? Lasu la najbaraj landoj regi tion. Instruado? Neniu lernodevo. Defendo? Neniu militservo. Justico? Neniu tribunalo. Por kriminalaj kaj civilaj kazoj oni devis iri al tribunalo en Belgio aŭ Prusujo. La loka juĝististo tiam devis refoliumi en sia Code Napoléon de 1804 aŭ sia Code Pénal el 1810 kaj elparoli verdikton por punoj kiuj kelkfoje en la propra lando ne plu ekzistis, de lando kiu intertempe ankaŭ ne plu ekzistis. Kondamnita por vagabondado en 1900? Domaĝe, ĉi tie oni ne plu tre faras problemon pri tio, sed en la franca imperio de antaŭ jarcento oni por tio akiris prizonpunon de ses monatoj. Tio okazis ĉe viro kiu almozpetis en Neŭtrala Moresnet.

Sed la lando tamen havis flagon (blua-blanka-nigra), ornaman moneron (per kiu oni ne povis pagi), ĝendarmon (de post 1854) kaj por momento propran poŝtmarkon (en 1886, ideeto de loka filatelisto, post du semajnoj oni malpermesis la poŝtmarkon). Oni liveris la poŝton fare de du poŝtistoj: prusa kaj belga.

En 1894 tie estis sesdek kafejoj, kaj ĉiujare aldoniĝis novaj. Pro la franca leĝo pri la libereco de komercado oni litere ne povis limigi la nombron da kafejoj. Ĉar publika ebrieco ne nomiĝis en la Code Napoléon, ĝi ne estis bridita en Moresnet. En 1904 tie estis kvar distilejoj kiuj tage kaj nokte produktis alkoholon. Ĉirkaŭ la kvarlanda punkto oni kontrabandadis amase. Pro la malaltaj impostoj la alkoholo el la neŭtrala regiono estis tre malmultekosta. En la nokto biciklantoj transiris la limon kun boteloj da brando en siaj tasoj kaj revenis kun luciferoj, kafo, teo, tabako, selo kaj sukero. Ĉaroj kaj 'aŭtomobiloj' transportis tutajn kargojn da mineralakvo: nur kelkfoje la doganistoj vidis ke tio koncernas alkoholon. La kontrabandado elkreskis de individua kromenspezo al profesie organizita ombre-ekonomio. Neŭtrala Moresnet fariĝis ia Eldorado kiu allogis figurojn ĉiaspecajn.

Kiu je la tria vendredo de la monato eniras la kafejon Select Kelmis, iom mirigite ekrigardas. Estas vilaĝkafejo kiel ĉiu alia: ruĝ-griza internon, viroj ĉe la bufedo, plasm-ekrano kun la eterna futbalo. Sed en postsaloneto jam dum jaroj kvinopo da homoj kunvenas por komenci la semajnfinojn per nekutima aktivaĵo: ili sekvas lingvokurson Esperanto. Ilia instruisto eksplikas la simplan gramatikon kaj vorto-trezoron, poste ili konversacias en la artefarita lingvo kiu en 1887 estis elpensita de Pol-Juda okulkuracisto el Litovio por progresigi la tutmondan solidarecon. Mondvaste estas ĉirkaŭ du milionoj da parolantoj, nur dumil el ili parolas la lingvon kiel denaskan lingvon - la plej konata sendube estas George Soros, la riĉega Uson-Hungara komercisto, verkisto kaj filantropo. esperantoklubetoj fakte ankoraŭ ĉie en la mondo kunvenas, sed en modesta vilaĝo kiel Kermet tio povas mirigi. Kaj tamen ne, ĉar Neŭtrala Moresnet iam devis fariĝi la plej unua ŝtato en la mondo, en kiu Esperanto estu la oficiala lingvo. La franca lingvodocento Gustave Roy, viro devena el la Ariège en la Pireneoj, dum jaroj laboris en Akeno kaj dum siaj vojaĝoj al Neŭtrala Moresnet amikiĝis kun doktoro Wilhelm Molly, la entuziasma entreprenkuracisto de Vieille Montagne. Ili interkontaktiĝis je la terenoj de la filatelio kaj filantropio. Molly

estis la viro kiu estus eldonita propran poŝtmarkon, Roy havis ankoraŭ pli kuraĝan ideon.

Mi parolas pri tio kun la sepdekkvinjara Mathieu Schrymecker, eksinstuisto kaj fondinto de la Eperantokurso en kafejo Select. 'Kiel tion diri al vi?' Li foliumas tra siaj tondaĵodokumentuoj. 'Gustave Roy promenis ĉi tie en Neŭtrala Moresnet. Esperanto ankaŭ estis neŭtrala. Finfine li volis reciproke ligi ambaŭ neŭtralaĵojn, vi vidu. Li volis doni al Esperanto patron.'

En 1907, la jaro en kiu la malgranda Emil alvenis ĉe siaj adoptgepatroj, Gustave Roy publikigis pamfleton en la franca lingvo en kiu li alvokis elkonstrui Neŭtralan Moresnet kiel mondĉefurbon de Esperanto. Tio estis iom rimarkinda: la diplomatikaj traktadoj inter Belgio kaj Germanio pri la definitiva stato de la regiono rekomenciĝis. En 1897 preskaŭ sepcent familiestroj subskribis peticion por farigi Neŭtralan Moresnet parto de Belgio se la neŭtraleco estos abolita. Ne ŝajnis ke la landeto ankoraŭ longe ekzistos. Sed Lejzer Zamenhof, la elpensinto de Esperanto, la viro kiu scipovis la hebrean, jidan, polan, rusan, germanan, francan, latinan kaj grekan, sciigis al Roy ke li legis ties traktaton 'kun granda intereso' kaj ke la realigo de ties plano estos grandega paŝo antaŭen 'por la interna ideo de la esperantismo'. Eĉ la New York Times opiniis la elekton de Neŭtrala Moresnet ne nelogika, ĉar - ekspiru - ĝi 'kuŝas proksime ĉe la transkontinenta relvojo de Konstantinopolo al Ostendo kaj Londono kaj ĉe tiu de Madrido al Sankt-Peterburgo'. Ke Gustave Roy kredis ke la tasko povos esti farita en ses monatoj, ie kaj tie kaŭzis levadon de la brovoj, sed dum la Kvara Esperantistokongreso en Dresden oni decidis ke ne Hago, sed Neŭtrala Moresnet devas fariĝi la ĉefsidejo de la internacia movado, ĝi ja kuŝis sur la tanĝosupraĵo de tri lingvoregionoj.

En Kermet mem oni entuziasme eklaboris. Po kvarfoje ĉiun semajnon okazis lecionoj Esperanto, kiujn tuj partoprenis cent kvardek infanoj kaj plenkreskuloj. Ĉe kelkaj restoracioj eĉ aperis la epigrafo *Tie ĉi oni parolas Esperanton*. La Select tiam ankoraŭ nomiĝis Gaststätte Bergerhoff, ĝi apartenis al juda familio kaj gastigis la kunvenojn de la esperantistoj. Okazis propaganda festo kun tricent kvindek enlandaj kaj eksterlandaj ĉeestantoj. La plano estis doni novan nomon al la ŝtato. Amikejo, litere 'loko de la amikeco'. Ĉu tio ne sonis pli bona ol Neŭtrala Moresnet? Kaj ĉar la unua himno laŭ la tonoj de '*O Tannenbaum*' tamen estis iom arĥaika ('*O Altenberg, o Altenberg/ Du kannst mir sehr gefallen / Doch als Esperantistenstaat / Das Land noch größeren Ruf jetzt hat*'), la loka trumpetisto kaj komponisto Willy Huppermann komencis verki la Amikejo-marŝon, forgesitan, sed belegan muzikaĵon.

La maljuna Schrymecker elaste ekstaras kiam mi komencas pri tio. 'Mi ankoraŭ tre bone konis Hupperman. Mi estas el familio de muzikantoj. Mia patro, miaj onkloj, ili ĉiuj ludis kun li. La Amikejo-marŝo estis tre konata. Tiam ankoraŭ okazis multaj baloj. Je la fino de la balo oni ĉiam ludis la Amikejo-marŝon.' Kaj por montri tion li kantas la unuajn taktojn de ĝi.

La vivo de Emiel Rixen komenciĝis kun butonetoj, nigraj butonetoj dense apude, oni ankoraŭ ne eltrovis la zipon, butonetoj kiuj ondas laŭ la ritmo de ŝia hasta spirado, alte en la brusto. Butonetoj de ŝia korseto, en kiu ŝi matene ankoraŭ purigis la ĉambrojn, tagmeze ankoraŭ surtabligis la supon el la supujo, ŝi sentis lian rigardon. Butonetoj kiujn liaj prizorgitaj fingroj malfermas unu post unu. Li pli ofte faris tion, tion ŝi povas percepti. Düsseldorf, en Majo 1902a.. Li estas posedanto de fabriko, ŝi estas servistino.

Por Marie Rixen, la servistino en Düsseldorf, ĉio nur komenciĝis kun la fajnaj, nigraj butonetoj, aŭ pli bone: ĉio misiris pro tiuj butonetoj, definitive misiris. Post kelkaj monatoj ŝi ĝin rakontas al li, balbutante, ili kuŝas unu apud la alia. Tuj finiĝas la karesado de liaj karaj manoj sur ŝia haŭto, kun liaj plenaj malseketaj

lipoj en ŝia kolo. Lia buŝo ne plu estas lia buŝo, sed nigra makulo kiu hurlas kiel unu el liaj ŝtalfornoj. For el liaj okuloj. El lia domo. Ŝi tiam devis esti pli singarda. Ke tio estas honto. Ĉu ŝi ne hontas? En lia propra domo? Li kiel fameliestro! Cetere, ĉu ĝi estas de li? Kiel ŝi kuraĝas aserti tion? Li konas ŝian popolspecon! Kaj krome ankaŭ plori?

En Düsseldorf ŝi ne povas restadi. Ŝi devas foriri, kie oni ankoraŭ povas spiri? Per la trajno ŝi povas iri al Kolonjo, suden laŭlonge de la Rejno, kaj tiam okcidenten tra la Eiffel al Akeno. Kaj de ĝi ŝi povas atingi la neŭtralan regionon, ok kilometrojn pli malproksime. Ĝi ne estas granda, ŝi scias, sed en la nana ŝtato Neŭtrala Moresnet oni malpli estas konata ol en la vasta Prusujo. Pli da knabinoj iris tien, el Germanio, el Belgio, eĉ el Svislando. Oni tie ne ĝenas vin. Ŝi naskas je la 14a de Februaro 1903, Valentintago. Ne ĉeestas amato, ne edzo, ne patro por esti fiera. La knabeto devas nomiĝi Jozefo, ŝi opiniis. Tiu ankaŭ vagabondis por sekure surmondigi sian idon. Jozefo Rixen. Ŝia filo akiris ŝian familinomon, nature, sed ne ŝian naciecon. Dum ŝi restas prusa, li estas registrita kiel 'Neŭtralano'. En la vilaĝo estas akuŝistino., kiu jes pli ofte trovas loĝejon por nedezirata infano. La familio Pauly, familio kun kvar infanoj, sin okupas pri Joseph. Ununura malavantaĝo: ili jam havas Jozefon en la familio. Tial la novulo nomiĝas Emil, Emil Pauly. Multe pli poste, kiam li estas dek du jara, li ekscias kun granda konsterniĝo ke lia vera nomo ne estas Emil Pauly, sed Joseph Rixen. La reston de sia vivo li uzos la miksformon: Emil kiel voknomon, Rixen kiel familinomon.

La manskribita letereto ne lasas dubon pri tio. Dato: la 17a de julio 1907. Emil/Joseph tiam estas kvar kaj duona jaroj. 'Ni subskribantoj konfirmas per ĉi tio ke ni ek de la 1a de Julio akceptas la malgrandan Emilon kiel nutrinfanon. Kiam vi portas al ni la monon, tiam la infano same kiel la aliaj infanoj ĉie havos egalajn rajtojn.' Subskribis: Frau Pauly, Johann Pauly kaj zur Beglaubigung urbestro Schmertz.

Je la 4a de Aŭgusto 1914 Emil estas dekkvinjara knabo. Li gimnastikas, li kunkantas en katolika ĥoro. Tiun matenon la germanaj trupoj transiras la limon kaj tiel rompas la Limtraktaton de Akeno de 1816. Ankaŭ la belga neŭtraleco estas piedpremita. La Unua Mondmilito estas fakto.

Dum la deknaŭa jarcento multaj junuloj iris al la ŝtato por eviti la militistan servon en Belgio aŭ Prusujo. Ĉiu junulo retrospektive estis rememorigita de siaj respondecoj pri la patrio. La sekvo estis, ke en 1914 estis junuloj kiuj estis mobilizitaj de la germana armeo, aŭ de la belga.

Tuj post la armistico en 1918 la komunumestraro pendigis afiŝojn en la vilaĝo. La teksto estis en la germana lingvo, la enhavo kontraŭ-germana. *Einwohner von Neutral-Moresnet! Zierr die Häuser! Steckt Fahnen aus! Der FRIEDEN ist gezeichnet!* Estis strange legi tiajn eŭforiajn frazojn en gotikaj literoj el 1918. En romia skribo oni daŭrigis: 'Per tio la sorto de la neŭtrala regiono estas sigelita! Neŭtrala Moresnet malaperis de la geografia karto! Belgio, kiu ŝirmis nin kontraŭ malsato dum malfacila tempo, estos nia patrio!' En la sama vespero ankoraŭ okazis *Volks-Versammlung* kaj *Fackelzug*, dum kiu oni faris *Hymne an Belgien*. La nova ĉefurbo de Emil fariĝas Bruselo. Li estas dekkvinjara kaj jam akiris sian trian ŝtatanecon.

La pafbudo, la barelo por en ĝi serĉkapti ion, la ĵetbudo, la karuselo, la kapo de Juto: estas kermeso en Kelmis, finfine koloro post jaroj plenaj de rubo kaj gruzo kaj pulvo.

Bela junulo vidas ŝerceman junan virinon kun perfektaj brovoj, tion ni scias, sed la konversacio, la diabla tasko de la unua interparolo, supoze sufiĉe pene disvolviĝas. Jeanne Lafèbre denaske parolas nek la germana nek la franca lingvoj kaj certe tute ne Kelmiser Platt. Emil iome rekonas tion, kion ŝi diras. Ŝi havas delikatajn, ludemajn lipojn kaj devenas de Tilburgo. Ŝiaj gepatroj dum la milito

donis loĝejon al rifuĝinto el Moresnet. Ĉar nun revenis la paco, Jeanne per propraj okuloj volas vidi la landon pri kiu ilia gasto parolis dum kvar jaroj. En la vilaĝa kermeso de Moresnet - en kiu jaro ni ne ekzakte scias - ŝi renkontas Emilon, ili ambaŭ tuj ege enamiĝas. La amleteroj kiujn Emil sendas post ŝia libertempo, estas unika genro: antaŭ la milito li en la lernejo nur lernis skribadon en la gotika skribo, gracia skribo kiun Jeanne ne povas legi. Nur ŝia frato Jacques scipovas ĝin, li laŭtlegas la leterojn al Jeanne, ofte ankaŭ kun ĉeesto de ŝiaj pli junaj fratinoj. Romantiko en Tilburgo estas kolektiva okazado. En 1923 Emil estas dudekjara. Li havas blujajn okulojn, kaŝtanbrunajn harojn, malkrudan nazon kaj rimarkinde plenajn lipojn. Li ankoraŭ ĉiam loĝas ĉe la nutrofamilio Pauly en la Kapellstraße. Lia duonfrato kaj samnomulo Joseph lernas al li la bakistprofesion,

La jaro en kiu Emil fariĝas servodeva, ankaŭ estas la jaro de la okupiĝo de la Ruhr-regiono. Laŭ Versajlo Germanio devis malmilitistigi la tutan maldekstran Rejnbordeon kaj lasi ĝin dek kvin jarojn al la aliancanoj. Sed ĉar ĝi en 1923 ankoraŭ estas pagenda la riparpagojn al la aliancanoj, Francio decidis armeo okupi la plej gravan industriregionon kaj preni ĝin kiel garantiaĵon. La Usonanoj kaj la Britoj ne kunagas, nur Belgio sendas 7500 virojn. Ĝi urĝe bezonas la riparpagojn por la rekonstruado de la detruita lando. Ankaŭ Emile devas iri, al Krefeld. Tie li vane klopodas viziti sian biologian patron,,, Frakasi. Pulvorigi. Fandi. Platigi, distiri, rulpremi. Kion la historio faras kun homvivo? Kaj tamen ekzistas formoj de rezisto. Post sia militservo Emil edziĝas kun Jeanne. Li komprenis ke la esenco de lia vivo ne estas en la pasejo, sed en la futuro. Kaj idoj venas, multaj idoj. Li, kiu neniam konis familion, startas familion kiu finfine konsistos el dek unu geidoj, naŭ filoj kaj du filinoj. Ili naskiĝas inter 1934 kaj 1950, antaŭ, dum kaj post la milito. Li estas 31-jara kiam li por la unua fojo patriĝas, 47-jara por la lasta fojo. Du el liaj infanoj pastrigis, unu eĉ iĝos episkopo en Brazilo.

Sed ĉiuj tiuj buŝoj devas esti nutrataj. Emil estas panisto en Kelmis, la komunumo kiu nomiĝas La Calamine de nun estas belga. Ili ĉiuj loĝas en la Kirchstraße, la rue de l'Eglise, ĉe la bakejo. La pano estas bakata en lignoforno kiun Emil unue ekbruligas kaj hejtigas antaŭ ol elskrapi la ardantan lignokarbon kaj enŝovi la panojn en ĝi. La freŝa, bonodora pano estas disportata per biciklo. Kiam tutaj kestoj kun ĉerizoj devas esti senkernigitaj la infanoj kunhelpas. La familio ne estas riĉa, sed prizorgita kaj pia. Je sabato ĉiu iras en la lavokuvon, je dimanĉo al la meso.

Tiam en 1940 La armeo de Hitler tansiras la limojn de Nederlando kaj Belgio. Moresnet fariĝas parto de Germanio: "Heim ins Reich", la ĉefurbo Berlino. Kaj Emil? Lia familio kreskadas. Tri infanoj naskiĝis dum la militjaroj, en la sama dormĉambro kiel la antaŭa kvinopo, kvankam ilia naskiĝloko nun oficiale nomiĝas Kelmis kaj Altenberg anstataŭ La Calamine. *Pro ŝia pruvita fekundeco la naziestraro volas honori patrinon Jeanne per la Ehrenkreuz der Deutschen Mutter: dekoracio por arja virino kiu naskas escepte multe da infanoj. Ŝi rifuzas. Kian rilaton ŝi kiel Nederlandanino kiu alilokiĝis al Belgio, havas kun Führer kiu asertas ke la familio estas 'la batalkampo de la patrino'?*

La naskiĝo de la sepa infano tamen alportas la plej tiklan zorgon. Kiel sepa filo en vico li laŭ praa belga tradicio devus akiri la belgan reĝon kiel baptonklon kaj portitias nomon. Tamen Kelmis ne plu estas parto de Belgio kaj la reĝo abdikis. La infano, intertempe 72-jara, mem eksplikas ĝin al mi: 'Kiel germana ŝtatano la registaro deziris ke mi akiru la antaŭnomon kaj baptonklecon de Hermann Wilhelm Göring.' Li montras la leteron kiun lia patro tuj post la naskiĝo ricevis de la Ortsgruppenleiter, leteron kun aglo, svastiko kaj sube Heil Hitler, kiu patron Emil recht herzlich gratulas pro lia sepa filo. 'Tio ne plaĉis al miaj gepatroj, ili

antaŭe pensis pri Leopold kiel antaŭnomon. Por la preĝejo mi tial baptiĝis kiel Leopold, sed por la administrado fariĝis Leo. Ili ne volis esti tro provokantaj"
Sed tiam tamen okazas: Emiel devas iri al la militfronto. La germana armeo tiom malgrandiĝis ke eĉ pliaĝuloj, malsanuloj kaj malbone edukitoj devas batali. Estas Septembro 1944, tri monatoj post la invado en Normandio, kaj oni sendas Emil-on al peco de antaŭa patrio, al la Hoge Venen en Belgio. La Amerikanoj alproksimiĝas: je la 2a de Septembro ili transiris la franc-belgan limon, je la 4a de Septembro ili liberigis Bruselon. La ĉefurbo dum tagoj estas en ebria pasio de muziko, kantado, ĉokolado kaj novaj korpoj. Sed Emil staras en senfina pejzaĝo kun eriko kaj sfagno. La silento, la nigraj pinarbaroj en la malproksimo, la rustkolora rivereto ĉe liaj piedoj. Ke tiu mondo ĉiam situis ĉi tie, tio estas nekomprenebla. Ke la nebulo ankoraŭ pendis super tiu marĉa silento, kiam li tre frue ŝovis la panojn en la ardantan fonon: li rigardas al ĝi. Tetro transflugas. Li pensas pri la hejmo, pri la bakejo, la familio. La Amerikanoj kiuj alproksimiĝas. Tiam li faras decidon. Li ne volus nomi tion dizerti. 'Dum ĉiu retiris sin, mi renkonte iris al la malamiko!' fariĝis lia standardŝerco en la postmilitaj jaroj. Ĉe la sursabla torftero de Mont Rigi li forkuris. Li vagas tra la arbaregoj, dormas en fojnejo. Kiam li estos kaptita de germanaj soldatoj, li ricevos la kuglon. Kiam li venas en la veziron de amerikaj trupoj, oni pafos al li. Li urĝe devas akiri burĝajn vestaĵojn, kiom longe li ankoraŭ povas iradi en ĉi tiu uniformo de la *Wehrmacht*? Familio en Baelen helpas lin per pantalono, ĉemizo, iom da laguno. Je tiu momento li ankoraŭ ne scias ke lia edzino Jeanne en la hejmo vizitiĝos de du germanaj policistoj. Ili esplordemandas ŝin kaj la infanojn kaj diras ke ilia patro estas matura por la kuglo.

Nur kiam la Germanoj estas forĉasitaj de la Amerikanoj, Emil kuraĝas hejmeniri. Tuj post la liberiĝo la belga ŝtatpolico nur disponas po unu pafilo por du policanoj. La arestado de kunlaborantoj tial esence okazas fare de rezistad-organizaĵoj, kun ĉiuj sekvoj pro tio. Ne estas tempo por nuanco, volo por nuanco ankoraŭ malpli. En la germanaj regionoj la opreso ne estas milda.

Intertempe Emil ekkonas la Amerikanojn je tute alia maniero. La rezisto transdonas lin al la liberiganto. Oni evidente ne arestis lin kiel Belgon, suspektitan de fikunlaborado, sed kiel Germano en militservo de la *Wehrmacht*. Kio estas vera. Sen iam translokiĝi li estis Neŭtrala, regnante de la germana imperio, enloĝanto de la reĝlando Belgio kaj ŝtatano en la Germana Regno. Antaŭ ol li refariĝos Belgo, sia kvina ŝtatanŝanĝo, li estas fortransportita kiel germana militkaptito. Li ne transiris limojn, la limoj transiris lin.

La kamiono kondukas lin al la stacio de Verviers. Tie oni ektransportas lin al Francio, al Compiègne, por pluvojaĝi de tio al Cherbourg en la ekstema punkto de Normandio. La vivokondiĉoj estas teruraj. La viroj portas siajn eluzitajn uniformojn kaj difektajn botojn, sed eĉ tiujn Emil ne disponas: li estas en burĝaj vestoj je la momento de lia arestiĝo. Oni disdonas malnovajn amerikajn arme-mantelojn, ŝuoj estas riparaĉitaj. Ili vivas sesope en unu kabano. La loĝantoj faras el malnovaj olebareloj kaj metalaj armeokestoj malbone trablovantajn stovojn. Ĉar Francio perdis centmiloj da viroj, Charles de Gaulle postulas la milit-arestitojn kiel laborantojn. En vico ili devas enskribigi sin, similas sklavovendejo. Du jaroj post sia hejmvieno el Cherbourg li ĉesigas la bakejon kaj la familio translokiĝas al la Patronagestraße, la domo en kiu mi nun aŭskultadas kaj notadas. Ankoraŭ aldoniĝas tri infanoj kaj li eklaboras en la lanfabrikoj de Verviers. Li malestimas la laboro mem, sed li pli lukras ol kiel panisto. En 1952 li tamen devas ĉesi. Liaj pulmoj kaj koro estas difektaj, eluzitaj. De tiam li pasigos siajn tagojn ĉe la fenestro, tranĉante legomojn por la tagmanĝo. Kaj dum Kelmis kaj la antaŭaj Orientkantonoj refariĝas parton de Belgio kaj en 1962 la limoj de la belga lingvoregiono estas fiksitaj kaj en la postaj jaroj la germana socio akiris ĉiam pli da politikajn rajtojn, la jaroj ĉe la fenestro malrapide pasas.

Hieraŭvespere mi vizitis la komunuman konsilantaron de Kelmis: la tagordo estis en la franca kaj en la germana lingvoj, la interkonsiliĝado en la germana kaj en

la dialekto. Koncernis la gastigon de kelkaj rifuĝantoj. La germanlingva socio nombras 70 mil enloĝantojn. Ĝi havas propran parlamenton, propran gazeton kaj propran radiofonion.

Sur la rando de kofro mi surmetas miajn montoŝuojn. Estas malvarme. Mi ŝlosas la aŭtopordojn, iras tra la malseka herbo kaj grimpas trans ĉirkaŭbarilon. Sube en la valo de la Geul kuŝas la vilaĝo. Ĉi tie iam estis la fosaĵo Schmalgraf. Oni preskaŭ ne plu povas vidi ion de ĝi. Ke iam laboris ĉi tie centoj da homoj, mi klopodas imagi. En la arbaro mi trovas kelkajn restaĵojn de muretoj kaj betonplaton, kie antaŭe estis ŝakto, profunda tricent metrojn. Mi reiras. En la apuda herbejo en la printempo reflorados la zinkviolo, la eksteme malofta planteto kiu nur prosperkreskas sur zinkoriĉaj teroj. Nenie alie en la mondo ĝi troviĝas. *Viola calaminaria*, belega flava floreto en la herbo. Sed nun ankoraŭ ne. Nun estas vintro kaj la unua neĝo falas.